Heinrich Heine,

# Kuŝas la somer-vespero

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Kuŝas la somer-vespero
krepuskante sur herbejoj.
Ora lun' de la ĉielo
brilas suben al la tero.

Ĉirpas ie ĉi la grilo,
movas io sin enakve.
La migrant' plaŭdadon aŭdas
kaj spiradon en trankvilo.

Ĉe la rivereto sole
banas sin elfino bela,
kaj briletas en lun-lumo
brak' kaj nuko siaj mole.

*Traduko de la Germana poemo "Dämmernd liegt der Sommerabend" de* Heinrich Heine *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 2015-03.*

*Arg-1132-2284 (2015-03-16 19:04:31)*

*La originalo troviĝas en la poem-kolekto "Libro de la kantoj", "La hejmenveno", LXXXV.*